

HENRIKO HERTZ

JOLANTO

LA FILINO DE L' REGO RENÉ

LAŬ LA DANA ORIGINALO

ESPERANTIGIS

HJ. J. RONEBERG



ILAREJO ESPERANTISTA

HELSINGFORS 1908

PREZO Fr. 1:25

4 Fr.

HENRIKO HERTZ

JOLANTO

LA FILINO DE L' REGO RENÉ.

LIRIKA DRAMO EN UNU AKTO.

*Vendata por profito de la propagando inter
Finnlandaj blinduloj.*



*De tiu ĉi libro estas presitaj kvindek nume-
ritaj ekzempleroj sur luksa papero.*



*Tiu esperanta traduko estas permesita de la
heredantoj kaj rajtposedantoj de l'verkisto.*

HENRIKO HERTZ

JOLANTO

LA FILINO DE L' REĜO RENÉ.

LAŬ LA DANA ORIGINALO

ESPERANTIGIS

HJ. J. RONEBERG.



ILAREJO ESPERANTISTA,
HELSINGFORS 1908.

547331



82-2

AL

SINJORO TH. CART,

kun kora danko
kaj konstanta
amikeco,

LA TRADUKISTO.

821.113.4-2

HELSINGFORS 1908,
PRESEJO de K. F. PUROMIES.

PERSONOJ.

Reĝo René, grafo de Provenclando.

Jolanto, lia filino.

Grafo Tristano de Vaudemont.

Kavaliro Ĵaŭfredo de Oranĝo

Kavaliro Almeriko.

Ebn Jahia, kuracisto Maŭra.

Bertrando.

Martho, lia edzino.

Vasalaro de l'grafo Tristano.

La ago fariĝas en Provenclando, en la valo de Vaucluse, kaj daŭras de posttagmezo ĝis sub-eniro de l'suŝo.

Tempo: meze de l'XV:a jarcento.

Maldekstre (de la ludantoj) oni vidas belan unue-taĝan domon, kun loniceroj kaj rozoj kreskantaj laŭ la muroj, kaj fermitaj kurtenoj post la fenestroj. De la domo etendas sin parto de ĝardeno kun riĉa sudlanda kreskaĵaro ĝis la plej proksima parto de l'fondo; proksime de l'domo, kelkaj daktilpalmoj. Post la ĝardeno sufiĉe alta monto kun arbetaĵo; en la monto *sekreta eniro*, kovrita de musko kaj ŝtonoj, kaj videbla nur dum ĝi estas malfermata. Post la monto oni vidas pli altajn kaj malproksimajn montojn.

UNUA SCENO

BERTRANDO. — Tuj poste KAVALIRO ALME-

RIKO. — Poste MARTHO.

BERTRANDO

(forvenas el la domo kaj parolas mallaŭte kun iu interne).

Sendito de la Reĝo sonorigis.

(Li trairas la scenon, malfermas la sekretan pordon, kaj revenas tuj kun *Almeriko*, sed haltigas lin en la eniro.)

Sinjoro Almeriko! Kiel? Vi?

Ne, ne! vi haltu! Oni ne eniras!

ALMERIKO.

Mi ja eniras!

BERTRANDO.

Ne, tre serioze!

Malpermesata estas la eniro.

Donante la signalon vi min trompis;

mi kredis, ke Raoul' alvenas.

ALMERIKO.

Li

ne povas veni. — Aŭdu do, Bertrando!

La reĝo sendas min! Jen lia ringo,

jen letereto, kiun li sigelis!

BERTRANDO.

La ringo? — Jes, ĝi estas lia ringo.

La letereto? — Nun, mi devas legi.

(Legante.)

„Vi fidu je sinjoro Almeriko:

„klarigojn bezonatajn al li donu!“

Oho! pardonu, kavalira moŝto!

Vi scias, se vi konas tiun lokon,

ke singardemo estas mia devo.

ALMERIKO.

Se mi la lokon konas? Tute ne!

— Sendito de la reĝo nur min gvidis

tra l' arbarego, montris al mi pordon

kaŝitan en la ŝtonegaro, puŝis

min tra malluma groto de la monto,

ĝis tiu pordo ĉi; — kaj nun mirante

mi vidas, ne dezerton malfertilan,

sed ĝardenegon, domon, — kiel bele

kaj ĉarme ĉio al mi tie ŝajnas!

Mi ne komprenas tiun ĉi enigmon.

BERTRANDO

(suspekteme).

Ĉu ne la reĝo al vi diris — — —

ALMERIKO.

Ne,

nenion diris li al mi.

BERTRANDO.

Pardonu,

sed vi komprenos, ke mi malplu devas

do ion diri.

ALMERIKO.

Vi nur ŝercas ja!

Bertrando, kara!

BERTRANDO.

Ne, tre certe ne!

MARTHO

(eliras el la domo.)

Kun kiu vi parolas? Ho, ĉu vi,

Sinjoro Almeriko?

BERTRANDO.

Ĵus li montris
la ringon de la reĝo, kaj li konas
nian signalon, kaj nenion plu.
Ne plaĉas al mi tio; — li foriru!

ALMERIKO.

Eliri, mi? sendito reĝa?

BERTRANDO.

Jes!

MARTHO.

Bertrando, vi permesu!

(Al Almeriko).

Kio estas?

ALMERIKO.

Mi devas diri al vi, ke la reĝo
kun lia kuracisto, Ebn Jahia —

MARTHO.

Mi konas lin, la faman Maŭron.

ALMERIKO.

Baldaŭ

li venos tien kun la reĝo; — zorgu,
ke la ordonoj de la kuracisto
pri la preparo estu plenumitaj.

BERTRANDO.

Nu! li je ni nur fidu! Sed cetere
la Maŭro tien venis jam hodiaŭ.

MARTHO.

Kaj ĉu nenium pluan avizeton
li al vi donis aliparte? diru!

ALMERIKO.

Li ŝajnis tiam esti okupata
pri la alveno de la kuracisto.
Raoul' ekmalsaniĝis. — Tial min
la reĝo vokis: „Mian plenan fidon
al vi mi donas: ne perfidu min!“
tiel li diris; — „sekvu la gvidanton,
kiun mi sendos; — iru!“

MARTHO.

Ĉu ĝi estas
do ĉio, kion nun vi scias?

ALMERIKO.

Preskaŭ.

La reston mi malbone nur komprenis.
Pli frue jam, li diris ŝanceliĝe:
„Vi songu bone, ke je vi mi fidas!
„Vi vidos tie, kien mi vin sendas,
„filinon mian —;“ iu venis, tial

daŭrigi buŝe li ne povis, — skribis
la leteron —

MARTHO.
Letereton?

BERTRANDO
(memorante).

Certe,

la letereton!

MARTHO
(leginte ĝin).

Kun sigelo reĝa!

Ni plu ne povas dubi!

BERTRANDO.

Vere, ne!

Pri tio mi ne pensis!

ALMERIKO.

Jen vi vidas,

ke lia Reĝa Moŝto mem ordonas,
ke vi al mi sciigojn devas doni,
des pli necesajn, ke kredeble mi,
anstataŭante nun Raoul'on, devas
plenumi nekonatan komision.

Ĉu mi filinon de la reĝo vidos?
Ja Margerito en Britlando estas,
Jolanto —

MARTHO.

— tie ĉi.

ALMERIKO
(sen halti).

— en Hispanlando

ĉe monaĥinoj estas edukata
de la plej malplenaĝa infaneco.

BERTRANDO.

Ne, kavalira moŝto! Tre sekrete
ŝi vivas tie ĉi. Strangege ŝajnas,
sed la sekreto, zorge nun kaŝata,
tre baldaŭ espereble jam solviĝos.
Ni tion ĉi atendas maltrankvile.

ALMERIKO.

Mi petas, ke vi ĉion diru!

BERTRANDO.

Certe. —

Ĝi estas mia devo. — Vi memoras
la militadon inter nia reĝo
kaj Antonio, la fiera grafo
de Vaudemont', pri Lorenlando.

ALMERIKO.

Jes,
sed tiu jam malnova militado

nun longe ja finiĝis; kaj la filo
de l' grafo, — kiel ĉiuj scias, — baldaŭ
edziĝos kun filino de la reĝo,
laŭ paco, de la duko de Bourgogne'
arbitraciigita. — Ho! precize;
Jolanto estas ja la fianĉino!
— Ŝi estis nur infano tiatempe.

BERTRANDO.

Ho! Dio prosperigu la aferon!
— Sed baldaŭ post la paco, granda brulo
flamigis la palacon de la reĝo.
Vi certe ankaŭ tion ĉi memoras.
Ĝi nokte ekbrulegis. La princino
Jolanto, — tiam unujara nur, —
preskaŭ pereis en la katastrofo.
La flamoj jam ĉirkaŭis ĉiuflanke
la ĉambron de l'reĝidinetto; — ni
nur unu solan savon por ŝi vidis
el plej terura, minacanta morto:
ni ĵetis la infanon en la korton
tra la fenestro, oni ŝin ricevis
zorgeme sur kusenoj kaj tapiŝoj.
Ŝi ne pereis. Sed, — ho ve! — Sinjoro,
ĉu pro la timo de la flamoj, ĉu

pro la teruro dum la falo, — baldaŭ
vidiĝis, ke ŝi poste estas blinda.

ALMERIKO.

Ŝi estas blinda?

MARTHO.

Jes, ho, via moŝto!

Kompatu nun de l'reĝo la sennoman
doloron! — Tiu bela infaneto,
— ho kiel bela kaj boneta! — blinda!
Ĉiu espero, kiun jam ŝi vekis,
sveninta ree! — nia militado
pri Lorenlando eble renovata,
kaj renovata nun eĉ pli kolere!
Ne ŝajnis ja kredeble, ke la grafo
de Vaudemont' elektos bofilinon
kiu blindiĝis! Li tre certe tuj
ja estus akuzinta nian reĝon,
dirante, ke ŝi ĉiam estis blinda.

ALMERIKO.

Ja tia estas Vaudemont'! Nu do,
kion la reĝo faris?

BERTRANDO.

Li unue
zorgeme kaŝis, ke ŝi estas blinda,

— ĉe unujarulino tio estis
ja ne frapanta; — poste li venigis
la faman kuraciston el Kordovo,
la lertan, admirindan Ebn Jahia'n.
Li venis, kaj ordonojn multenombrajn
li al ni donis dum kreskado ŝia.
Li fine ŝian horoskopon ĵus
desegnis.

ALMERIKO.

Nu?

BERTRANDO.

Li tiam al ni donis
esperon, ke vidadon ŝi rehavos
je la dekseca jaro; tiu aĝo
redonos al la nervoj de l'okuloj
la forton antaŭ tiam ne haveblan.
— Ŝi plenumigis la diritan aĝon,
kaj Ebn Jahia, reveninte, donis
ordonojn multajn al ni ambaŭ ree;
— ilian utilecon mi ne vidas.
Li diris, ke la tempo ne ĉeestas.
Ho, iam ĝi ĉeestu!

ALMERIKO.

Sed Jolanto?

Ĉu ŝi de la blindeco tre suferas?

MARTHO.

Ŝi mem ne scias, ke ŝi estas blinda.

ALMERIKO.

Ŝi mem ne scias —? Vi ja volas ŝerci!

MARTHO.

Ne, kavalira moŝto, ne! — Vi vidos,
ke mi la veron diris. Sed antaŭe
permesu, ke mi grave vin petegas,
ne diri eĉ vorteton pri vidado
aŭ kiel ajn rilate al la lumo;
ĉar tio estas ĉiam la kondiĉo
por alvenantoj en ĉi tiun lokon.
Vi ne parolu pri la taga helo,
nek pri la luma luno de la nokto,
nek pri la steloj, — ve! ĉar ŝia nokto
profunda, nigra, ne la stelojn konas.

ALMERIKO.

Kaj vi akceptis la kondiĉon?

BERTRANDO.

Ni

dum ŝia infaneco jam kutimis
al ĝi, kaj ekzercadis sendanĝere.

ALMERIKO.

Sed kial la blindeco ĉiam estis
al ŝi kaŝata? Kiu ĝin ordonis?

H. Hertz. Jolanto.

2



MARTHO.

Mi tion ne precize scias, — eble
la reĝo, aŭ la Maŭra kuracisto.
La kaŭzo eble estis tiu ĉi:
Ŝi estas ja portonta grafan kronon,
— vi tion scias, — kaj la estonteco
brilante antaŭ ŝi sin malfermigas.
Sed oni timis, ke kriplesco tia
tro ĉagrenigus ŝian junan vivon:
ŝi iĝus tiel tro melanĥolia,
kaj perdus tro de la gajeco ĉarma,
per kiu landestrinoj devas regi
en ĉiuj koroj. Tial oni eble
de ŝi fortenis la malgajan scion.

ALMERIKO.

Ĉu tial ŝi en tiu valo restas,
ne iun ajn fremdulon renkontante,
de kiu ŝi ekscii tion povus?

BERTRANDO.

Jes, tiel estas. Montoj de Vacluse
al ĉiuj homoj kaŝas nian hejmon.
Vi scias, ke la reĝo amas, ĉie
kulturi florojn kaj fruktarbojn planti.
Li mem ordigis ĉion tie ĉi.
La reĝidino kiel floro kreskis

ĉe tiuj floroj. Nun ŝi trovas mem
la vojon ĉien kun lerteco ĉarma.
La reĝo ŝin tre bone instruadis:
ŝi ŝpinas, teksas, kaj facile faras
la manlaborojn, zorgas pro la floroj.
— Ŝi tiel ĉiam estas laboranta
kaj ĉiam ĝoja. — Dum la libertempo,
ŝi ludas la liuton, aŭ ŝi verkas.

ALMERIKO.

Ŝi verkas?

BERTRANDO.

Jes, la reĝo ŝin instruis
pri ĉiuj leĝoj de la poezio.
Ŝi verkas do poemojn en la kapo,
plej indajn de l'plej famaj trubaduroj.

ALMERIKO.

Nu, tio ŝajnas ja kredeble. Nur
ke ŝi ne scias, ke ŝi estas blinda,
mi ĝin ne povas kredi. Estas ŝerco.

MARTHO.

Vi tiel kredas, tial ke l'okuloj
gvidadas vin ĉe ĉiu antaŭpaŝo.
Vi ja kutimis turni la rigardon
al ĉiu sono, kiun vi ekaŭdas.

Eĉ en la nokto vi ja serĉas lumon.
 — Sed kiu ajn dum sia infaneco
 blindiĝis, ja ne povas eĉ ekpensi,
 ke la aliaj homoj havas vidon.
 — Ĉu eĉ ekzistas do por ŝi vidado?
 ĉu eĉ ideon ŝi pri lumo havas?
 Objektojn, kiujn ni per vido trovas,
 ŝi per orelo aŭ per mano sentas,
 per movo de l'aero kaj per iloj
 al ni tre malfacile imageblaj
 kaj kompreneblaj. — Vi spertiĝos baldaŭ
 pri tio, kiam vi kun ŝi parolos.

ALMERIKO.

Mi tion ĉi jam vere tre deziras!
 Sed unu restas nur neklarigate:
 Ŝi vivas tie do sen societo?
 Ĉu tiu valo estas ŝia mondo?

BERTRANDO.

Jolanto tute sola ne vivadas,
 pri tio vi eraras. Tra la montoj,
 el la monaĥinejo Sankta Klaro,
 la abatino venas nin viziti
 kun kelkaj monaĥinoj. Kaj la reĝo
 enlasis kelkafoje vizitantojn.

ALMERIKO.

Kaj ŝi nenion plu deziras? Kelkaj
 maloftaj vizitantoj venas tien,
 kaj ŝi ne eĉ suspekton pri la mondo
 — la vasta universo, — iam havas?
 ne faras eĉ demandon?

MARTHO.

Ha, sinjoro,
 decide tion diri mi ne povas.
 Ŝi eble mem devigas la demandojn
 silenti. Ŝi ja scias, ke la valo
 eniron havas; kaj la sonorilo,
 viziton anoncante, ŝin ĝojigas.
 Atente ŝi aŭskultas, — sed demandon
 pri la eniro ŝi ne faras, nek
 pri tiuj landoj, kien ĝi kondukas.
 Ŝi scias, ke je ni ŝi devas fidi.
 — Simile la infanoj ja vivadas.
 Parolu nur kun ili pri Diaĵo,
 pri vivo post la tombo, — kaj vi vidos,
 ke ili ekmirante vin aŭskultas;
 — dubeton kelkafoje ili montras
 per la okuloj grande malfermataj,
 kaj fine ili vin kun plena, pia
 konfido nur aŭskultos, ne komprenos.

Nu, eble tiu mondo por Jolanto
 enigmo estas plena je misteroj;
 sed se la reĝo, aŭ se l'abatino
 al ŝi respondas: „trankviliĝu nur!
 vi estas nun tro juna por kompreni!“
 — ŝi pie silentiĝas, ne sciante,
 ke por kompreni ĉion, la vidado
 nur al ŝi mankas, kaj ke ni ĝin havas.
 — Kaj eble, via Moŝto, ni, revante
 pri la Eterna Vivo aŭ pri Dio,
 nur en blindeco ĉiuj eraradas,
 ĉar ni vidadon veran ne posedas;
 — la kredo nur en tiu nokto lumas.

ALMERIKO.

Vi eble estas prava, bona Martho!
 — Sed kion faras ŝi?

BERTRANDO.

Ŝi dormas.

ALMERIKO.

Dormas?

Je tiu horo?

BERTRANDO.

Ĉiutage, jes.

La kuracisto tion ĉi ordonis. —

Sed nun la dormo estas ne natura.
 Mi mem ne scias, kion pri ĝi pensi.
 Per kelkaj vortoj kaj sekretaj signoj
 de l'kuracisto, ŝi en dolĉa dormo
 sensente svenis; — tiam li almetis
 al sia brusto ian poluritan
 juvelon, — eble sanktan talismanon.
 Kaj nur se oni tiun ĉi juvelon
 forprenos, estos ree ŝi vekata.
 Min tio ĉi maltrankviligas.

ALMERIKO.

Nu,

li espereble estos prava.

BERTRANDO.

Dio

nur volu tion!

(Oni aŭdas sonoradon).

MARTHO.

Aŭdu!

BERTRANDO.

Jen la reĝo!

ALMERIKO.

Ĉu ofte li vizitas vin?

MARTHO.

Ho jes;

Dum li en la palaco reĝa loĝas,
li venas ofte. Kelkafoje tamen
vojaĝoj longaj aŭ aliaj kaŭzoj
malhelpis lin alveni dum monatoj.

ALMERIKO.

Ĉu lin Jolanto konas kiel reĝon?

MARTHO.

Ne, vi feliĉe memorigis tion:
ŝi ĝin ne scias. Patron ŝi lin nomas,
kaj ni Raimbaŭt'on. Tiu estas nomo
de trubaduro de l' malnova tempo.

ALMERIKO.

La reĝo venas.

DUA SCENO.

LA REĜO RENÉ, EBN JAHIA kaj BERTRANDO
eniras tra l' sekreta pordo. ALMERIKO. MARTHO.

REĜO.

Jen do, kara Martho,
jen do la kuracisto! — Sed mi aŭdas,
ke li jam venis tien ĉi hodiaŭ.
— Kiel ŝi fartas?

MARTHO.

Ĝis nun, laŭ deziro.

REĜO.

Vi ja memoris ĉiujn la ordonojn
de l' kuracisto? Ĉu ŝi dormis ĉiam
kun la okuloj bandaĝitaj?

MARTHO.

Certe

REĜO

(al la kuracisto).

Ĝi estis ne facile. Ŝi ja ne
kutimis malsaniĝi. — Sed feliĉe
de abelete estis ŝi pikita
en la tempio; — tion ĉi pretekston,
ni uzis. — Ho, trompiĝis la abelo!
En tiu flora mondo, kie ŝi
prosperas kaj vivadas kiel rozo,
ĝi, allogata de beleco ŝia,
eniri kredis en kalikon floran.

— Pardonu! ne ja decas, fanfaroni
pri mia propra filineto! — Venu!
Vi vidu la rezultojn de l' ordonoj
de vi donataj! — Vi, Bertrando, Martho,
vi sekvu lin! Li eble vin bezonas!
(*Ebn Jahia*, kun *Bertrando* kaj *Martho*, eniras
la domon).

Nu Almeriko! kio al vi ŝajnas
pri tiu bela kaj pacema valo?
Ĉu ĝi ne estas paradizo?

ALMERIKO,

Vere!

REĜO.

Ho, se la sorto nur al mi permesus,
kun mia amikaro tie vivi,
— vivi por la sciencoj, la belartoj, —
kiel volonte mi forlasus tuj
Lorenan kaj Neaplan ambaŭ landojn
al Vaudemont' —

ALMERIKO.

Sed tiu militado
ja estas finigita; — baldaŭ venos
grafo Tristano mem —

REĜO.

Jes, espereble,
kaj la espero gajnis novan forton.
Ĉu mi rakontis, ke min ĵus vizitis
Ĵaŭfredo de Oranĝo? Li vivadis
nun jam dum kelka tempo ĉe Tristano,
lin en la poezio instruante.
Li diras, ke la juna grafo havas

talenton belan por la versfarado,
laŭdindajn sentojn, grandaniman koron,
kaj lertan spriton por la pensojn plekti.
Ĵaŭfredo kantis al mi sirventes'on
de l'grafo; — ĝi tre bela vere estis,
kaj montris viran forton. — Mi volonte
konfesas tion, kvankam la poemo
pri Lorenlando akre min atakis.
Ho! — oni ekparolas!

(Li iras al la pordo kaj malfermetante ĝin
rigardas internen.)

Ebn Jahia

ŝin vekis, — ŝi malfermas la okulojn.
Aŭskultu! ŝi parolas kiel sonĝe,
dum li la du okulojn ekzamenas.
Li nun remetas sian talismanon
sur ŝian bruston — Nun ŝi ree dormas.

ALMERIKO.

Mirinde!

REĜO.

Jes, mirinde! Tiu viro
posedas ecojn, kiuj min timigas.
Li venas jen — nin lasu solajn!
(Almeriko volas foriri.)

Haltu

Vi iru hejmen, — mi ja devas resti;
letero de Tristano baldaŭ venos;
tuj portu ĝin al mi. Vi nun ja konas
nian signalon?

ALMERIKO.

Certe, mia reĝo!

(Li foriras. Samtempe *Ebn Jahia*
elvenas el la domo.)

REĜO.

Nu, mia Ebn Jahia! Ĉu vi venas
kiel kolombo kun olivfolio?
Vizaĝo via estas serioza;
traduki ĝian lingvon mi ne povas;
parolu!

EBN JAHIA.

Mi esperas, nobla reĝo!

REĜO.

Ĉu vere? — Ho, vi mian savon portas!
Simila al la Maŭro ĉe l'Kristnasko,
vi montras nun per trajtoj brunigitaj
la supreniron de ĝojiga stelo.
— Sur kio do vi fondas la esperon?
Ho diru al mi, kion vi decidis!
Mi havas hejme libron, kiu diras,

ke oni per tranĉilo kelkafoje
kuracas la blindecon. Ebn Jahia!
Vi tion certe nun ne volas fari?
Vi scias ja ke la okulo estas
de l'homa korpo multvalora parto;
kaj vi ja ne kuraĝus proksimigi
tranĉilon al okuloj tiel belaj!
Ilian bluon vi konfuzi povus,
la helan, iom ja melanĥolian,
sed tiel klaran! Ve! okuloj ŝiaj!
Neeble ŝajnas, ke la nokto sidas
en du okuloj tiel senmakulaj!

EBN JAHIA.

Mi povas plene trankviligi vin.
Neniel helpus tie ĉi la uzo
de instrumentoj.

REĜO.

Kion do vi faros?

EBN JAHIA.

Pri tio ni silentu. La procedo
al la sekreta arto apartenas.
Mi ĝin al vi klarigus malfacile.
Mi jam de longe ĝin preparis; — ĝi
ne estas la rezulto de momento.
Ĝi nun atingos baldaŭ la sukceson,

kaj nun se Dio volas mi ĝin finos
hodiaŭ jam, aŭ — tute ne.

REGO.

Hodiaŭ?

EBN JAHIA.

Dum la minuto, kiam ĵus la suno
post la montaro estos subirinta,
sed lasis dolĉan helon, tolereblan
por la okuloj nove malfermitaj,
la tempo min favoros.

REGO.

Jam hodiaŭ?

Ho, Ebn Jahia! jaron nun post jaron
mi tiun ĉi momenton jam atendis
senpacience. — Maltrankvile nun
mi volus ĝin prokrasti! — Nu, ĝi estu!
La suno baldaŭ nun subiros, — eble
kun ĝi espero mia! Sed ĝi estu!

(lin rigardante.)

Vi staras muta. Ĉu vi ŝanceliĝas?

EBN JAHIA.

Ne, tion mi ne faras.

REGO.

Ĉu vi timas?

Ĉu vi ne estas certa? La scienco
devigas ja la stelojn ekparoli:
vi konsiliĝis ja kun ili, diru!
Ĉu ili helpas vian entreprenon?
Konstelacio estas ja favora?

EBN JAHIA.

Mi tion diris jam al vi. Sed *astra
inclinant, non necessitant*. La sorton
de l' homoj ili certe influadas,
sed nek kontraŭnature, nek perforte.
Je tiu flanko mi nenion timas;
alia kontraŭstaros nun malhelpo.

REGO.

Malhelpo?

EBN JAHIA.

Kaj mi timas, nobla reĝo,
ke ĝin forigi tre ĉagrenos vin.
— Jolanto devas, antaŭ la kuraco,
kompreni, kio al ŝi mankas nun.
(energie.)

Ŝi devas aŭdi, ke ŝi estas blinda,
hodiaŭ jam.

REGO.

Ho, Ebn Jahia! Ne! —
Ne, ne, mi diras! tion ŝi ne aŭdos!

EBN JAHIA.

Ĝi estas la kondiĉo necesega
de la kuraco.

REGO.

Ne, neniam! Ne!

Ĉu vi do volas ke mi estu tiel
kruela? Ni ne devas neniigi
nescion ŝian! Ŝi feliĉa estas:
Ĉu la terura vero do atakos
la koron de la malfeliĉulino,
ne paŝo nur post paŝo, sed subite?
Kaj se vi ne sukcesas? — Vi forgesis,
kiel per nekredeblaj zorgoj ĉiam
ni kontraŭ la malgaja scio gardis
Jolanton. — Via estas la ordono!
Vi mem la malfacilan vojon montris,
kiun ni devis sekvi! nun vi ĉion
disĵetas! — kial?

EBN JAHIA.

Mi respondos kial,
se vi trankvile volas min aŭskulti. —
Vidado ŝajne loĝas ĉe l'okuloj,
sed ili estas iloj nur. Vidado
rezidas ĉe l'animo; ĝiaj nervo

eliras el la cerba laborejo.
Jolanto devas koni sian staton.
Vidado en ŝi devas ni malfermi
por ke ŝi mem malfermu ĝin ekstere.
En ŝia cerbo devas ŝi kompreni
la lumon, kaj deziri ĝin unue.
Ĉar vidu, via Reĝa Moŝto! ĉion,
kion la homo gajnas, li akiras
nur per deziro forte eksentata,
per movo profundega de l'animo,
serĉante ĉie nur objekton sian.
Mi tion ĉi klarigu per ekzemplo
al vi proksima. La scienco gaja
de l'belaj artoj kaj de l'poezio,
per kiu Provenclando estas fama,
ĝi estas al la homoj ja donata
de la ĉielo. Ĉu al ĉiuj homoj?
Ne, nur al iuj, ĉar en siaj koroj
revante ili kaŝis ĝian mondon,
kaj vekiĝinte, ĉiam ĝin deziras.

REGO.

Mi ne kun vi disputi povas, Maŭro!
En la scienco vi min ĉiam venkos.
Tro forte tamen mia koro krias,

mi viajn kaŭzojn tial jam ne aŭdas.
— Mi tion ĉi ne povas; — ne, neeble!

EBN JAHIA.

Vi faru kiel vi deziras do!
Mi povas nur konsili. Se vi min
ne volas kredi, nu, adiaŭ! Vi
ĉe l' monaĥejo povos trovi min,
se vi pri tiu ĉi decido pentas.
Memoru nur: por ĉiam la princino
blindiĝos, kiam pasos la tagfino.
(Li foriras tra l' sekreta pordo.)

REĜO
(sola).

Terure! Ĉu mi tiel kare pagos
esperon, kiu estas ja necerta,
— kaj vidos do malĉagrenecon ŝian
ŝanĝiĝi en nekonsoleblajn plendojn,
— junecon ŝian velki kaj pereii?
Ne! Ebn Jahia ŝajnas nur obstina.
Mi lin konvinkos! Tuj mi volas iri
paroli kun li, kaj lin decidigi!
(Li sekvas la kuraciston. Iomete pli frue, *Ber-*
rando kaj *Martho* estas enirintaj.)

MARTHO.

La reĝo iris for ekkolerinta,
kaj ankaŭ Ebn Jahia'n mi ne vidas.
Kio nun estas?

BERTRANDO.

Dio tion scias!
Sed certe, mi pri tiu ĉi afero
tre maltrankvila estas. Tiu Maŭro
nin eĉ perfidos eble.

MARTHO.

Ĉu vi kredas?

BERTRANDO.

Nu, Dio volu, ke mi nur eraras!
Sed mi ne amas la kaŝemajn homojn;
— li ĉiam ŝajnas kvazaŭ ŝpari vortojn,
kaj mi konfesas, ke mi timas povon
supernaturan, kiun li posedas.
Jen la princino dormas sur la lito
kiel mortinta. Se li faras signon,
ŝi tuj ekdormas, kiel per miraklo.
Tio ne taŭgas, Martho!

MARTHO.

Trankviliĝu,
 kaj ne vin penu per malsaĝaj timoj.
 Ĉu vi forgesis, ke post la vekigo
 tuj, kiam li la talismanon prenis
 de ŝia brusto, ŝi plej sana ŝajnis?
 Mirinde estis, kiel tiu dormo,
 pli ol la nokta iam, ŝin fortigis,
 ŝin senlacigis kaj ŝin revivigis.
 Eĉ la okuloj, — mi rimarkis tion —
 pli klare brilis, kiam ŝi vekigis.
 Lumaj radioj ŝajnis ekrovintaj
 la vojon tien, dum dormado ŝia.
 Esperu ni je tiuj antaŭsignoj!

BERTRANDO.

Vi eble estas prava; — nu, ni vidos!
 — Sed ni foriru. Multe da aferoj
 farindaj estas nun en la ĝardeno,
 kaj la princino dormas; sendanĝere
 ni ŝin forlasu: ŝi ja ne vekigos!
 (Ili foriras post la domon.)

TRIA SCENO.

TRISTANO DE VAUDEMONT. ĴAŬFREDO DE
 ORANĜO. (Ambaŭ portas citron pendantan al la
 ŝultro.)

ĴAŬFREDO

(interne de l' pordo sekreta).

Vi gardu vin! Ja estas mallumege!

TRISTANO

(ankaŭ interne de l' pordo).

Antaŭen nur! — Haltu! Jen pordo.

ĴAŬFREDO.

Pordo?

TRISTANO.

Atendu — jen seruro — mi malfermos —
 (enirante).

Kion mi vidas?!

ĴAŬFREDO.

Kiuj belaj floroj!

TRISTANO.

Ĝardeno tie! — meze de l' dezerto!
 Kaj kiel bela! Kiel orda! Vidu!

ĴAŬFREDO.

Mi kvazaŭ falas de l' ĉielo!

TRISTANO.

Kiu

posedas tiun lokon? Vi ja konas
la landon. Kiu loĝas tie?

ĴAŬFREDO.

Nu,

pri tio ĉi neniam mi eĉ songis!
Kiel tropika, riĉa kreskaĵaro!
Kiel maloftaj floroj, belaj palmoj!

TRISTANO.

Kaj jen la domo tie! kiel rave
de rozoj kaj de loniceroj preskaŭ
kovrata! — La loĝantoj —

ĴAŬFREDO.

— nevideblaj!

Tiu ĝardeno certe kreskis tuta
per sorĉo, ian nokton, dum Diano
ripozis kaŝe ĉe Endimiono
en la montaro ĉarma de Vacluse.
Nu, tiam la loĝantoj ja forkuris!

TRISTANO.

Ne, homoj certe loĝas kaj kulturadas
kaj ĉirkaŭiras tie ĉi. Mi vidas
jen piedsignon en la sablo.

ĴAŬFREDO.

Jes,

kaj de beleta piedeto! Bone!
Ni sekvu la postsignojn! Ili iras
laŭ la aleo, post la loĝdometo.

TRISTANO.

Ne ni atendu nur, ke iu venas, —
ne estu malĝentilaj! Ja sufiĉas,
ke jam senpermesite ni eniris!

ĴAŬFREDO.

Nu, kiel vi deziras! Se bonsorto
favoras nin ankoraŭ, mi ĝojiĝos,
ĉar tion vere mi bonsorton nomas!
Ni promenadas laŭ la monaĥejo
kantante vice, kiam mi ekvidas
reĝon René'on, konversaciantan
kun la Kordova kuracisto. Vi
decidas lin eviti, tiras min
kun vi, kaj dum ni rapidiĝas for

tra la branĉaĵo, jen vi trovas pordon
videble artfaritan en la monto.
Ni ekzamenas ĝin, ni ĉirkaŭpalpas
en la mallumo, kaj alvenas tien!
Sed diru nun, pro kia kaŭzo vi
ne volis tuj saluti mian reĝon!
Vi venis ja viziti lin; vi petis,
ke mi vin sekvu morgaŭ ĉe l'palaco,
kaj vi, — nu, ĉiuj tion bone scias! —
kun nia reĝidino fianĉiĝis.

TRISTANO.

Mi? — fianĉiĝis? — Oni tiel diras.
Mi estis tiam knabo, nur naŭjara.
Kun mia patro la Bourgogne'a duko
decidis ĉion kaj kondiĉis pacon.
Sed mi ne estas plu naŭjara nun!
La paco, kiu nin haltigis meze
de nia venko, nun min kolerigas,
kaj mia fianĉeco multe pli.
Malĝoje mi alvenis, kaj malĝoje
en tiu ĉi afero ĉiun paŝon
mi faras.

ĴAŬFREDO.

Tion ĉi mi tre bedaŭras.

Mi scias, ke la reĝo jam de longe
ĝojiĝas tre pri tiu geedziĝo.

TRISTANO.

Jes ja! *li* povas tre ĝojiĝi! — Certe
vi vidis la princinon?

ĴAŬFREDO.

Ne. Ŝi loĝas
en Hispanlando, en monahinejo.
Ŝi venas tien por la edziniĝo.
— Sed ni memoru, kie mem ni staras!
Ni tien ĉi alvenis, kaj la loko
belega estas. Sed ni devas timi,
ke la foriro estos malfacila.

TRISTANO.

Ho, sendanĝere!

ĴAŬFREDO.

Eble jes; — ĉu vi
ne volas serĉi do la ĉeestantojn,
frapi la pordon? Ĉu do mi —?

TRISTANO.

Permesu!

Se magiisto aŭ demono venas,

mi devas lin unue kontraŭstari,
Ĉar mi ja vin enlogis tien ĉi.

(Li frapas la pordon.)

Neniu venas.

ĴAŬFREDO.

Provu do malfermi!

TRISTANO.

Ne decas ja —

ĴAŬFREDO.

Kontraŭe! Iru nur!

TRISTANO.

Nu do —

(Li malfermas.)

Ĉielo! Kia vido! Ha!

ĴAŬFREDO.

Demono?

TRISTANO.

Kiel? — eble jes, — demono,
sed brila do demono de l'aero!
Jen! Jen!

ĴAŬFREDO.

Bela fraŭlino ripozanta!

— Ŝi dormas ja!

TRISTANO.

Ŝi dormas. Ŝia brusto
dolĉege movas, dum ŝi respiradas.
— Ho, vidu! Ŝia buŝo ekridetas,
ŝi ŝajnas aŭdi min!

ĴAŬFREDO.

Tristano! venu!

Mi petas, ni foriru! Venu do!
Beleco tia min malkvietigas,
ĝi estas nur tro bela, nur tro sorĉa!
Magia estas ĉio ĉi; ni marŝas
inter kaŝataj insidiloj. — Aŭdu,
Tristano! — Ho ĉielo kompatema!
— li estas jam ensorĉigita, — staras
kiel kreskaĵo! — li ne povas movi!

TRISTANO

(staras ravate).

Mallaŭte do, Ĵaŭfredo! Vi ja povus
ŝin vekti! Nur mallaŭte! Peko estas
maltrankviligi la ripozon, kiu
sur la ĝardeno mem sin portas!

ĴAŬFREDO.

Venu!

TRISTANO.

Silentu, mi ja diras! Sankta estas
la loko!

(Genufleksante kaj etendante la
manojn al la malfermata pordo.)

Ne koleru, se mi venas
profane en sanktejon vian!

ĴAŬFREDO.

Vere,

vi min timigas! Vi ne estas saĝa!
Vin ensorĉigis tiu iluzio,
ĝi ne ekzistas! Sekvu min!

TRISTANO.

Neeble!

ĴAŬFREDO.

Almenaŭ ne vi kiel bildo staru!
Decidu! Ion faru! Se vi ne
foriri volas, veku la fraŭlinon,
demandu ŝian nomon!

TRISTANO.

Kiel? Ne!

estus domaĝe.

ĴAŬFREDO.

Nu, mi mem do iros.
(Li eniras.)

TRISTANO.

Senrespektulo! — Jen li vokas! — jen
li prenas ŝian manon —

ĴAŬFREDO

(elvenas konfuzita).

Ni forkuru!

Vekiĝi ŝi ne povas! — ŝin posedas
mistera ia povo de spirito!

Ho venu! Mi suspektas malfeliĉon!

Ni malrespektis templon, kaj ni mortos!

TRISTANO.

Jes templon! — Sed ĝi morton ne signifas,
ĝi donas novan vivon! — La sanktejon
ni nun forlasu, — ni senrajte venis
kaj ĝin eniris! Ŝi ja dormas, vidu!
Nekavalire estas resti!

ĴAŬFREDO.

Nu,

do venu!

TRISTANO.

Nur rigardon! — vi permesu

al mi, eniri unufoje nur!

mi poste sekvos vin.

(Li eniras.)

ĴAŬFREDO.

Li genufleksas

Kaj ŝian manon li silente kisas . . .
Ho kiel li rigardas ŝin! — Li prenas
de ŝia kolo rubandeton — Nu,
dank' al ĉielo, fine vi revenas!

TRISTANO

(elirante).

Nun mi por ĉiam fiksas en la koron
la belajn trajtojn, — ili ne foriĝos!
Jes, ni eliru pie! — mi promesis,
ke mi revenos baldaŭ, kaj mi kredis,
ke dolĉe ridetante ŝi aŭskultas
dum sia dormo la promeson. — Vidu,
mi tiun ĉi juvelon poluritan
de ŝia brusto prenis kiel signon,
simile al Davido, kiu tranĉis
draperon de l' mantelo reĝa, dum
la reĝo dormis. — Sed ĝi montros nur,
ke mi ĉeestis, — ke ŝi mian vivon
posedis plene, eĉ dum sia dormo. —

KVARA SCENO.

LA SAMAJ PERSONOJ. JOLANTO.

(Malgraŭ sia blindeco, Jolanto movas facile kaj sentime. Nur aŭskulta movo, aŭ mano etendata, kiel por palpi, iafoje montras, ke ŝi ne vidas. Ŝiaj okuloj estas malfermataj, sed senmovaj kaj ofte mallevataj.)

JOLANTO.

Martho! Bertrando!

TRISTANO.

Jen! ŝi venas mem!

JOLANTO.

Iu parolis tie.

(Ŝi iras laŭ la voĉo rekte al *Tristano*.)

Kiu estas?

TRISTANO.

Fremdulo kiu petas vin pardoni,
ke li malkvietigis vian pacon.

JOLANTO.

Donu al mi la manon!

(*Tristano* donas al ŝi la manon.)

Mi neniam

estas aŭdinta vian voĉon. — Eble
kun Martho aŭ Bertrando vi parolis?

TRISTANO.

Mi ilin ne renkontis, nur okaze
mi venis.

ĴAŬFREDO
(mallaŭte al *Tristano*).
Informiĝu pri Bertrando!

JOLANTO
(aŭskultante).
Kiu alvenis plu?

TRISTANO.
Amiko mia,
nobela kaj tre lerta trubaduro.

JOLANTO.
Mi vin salutas ambaŭ. — Ĉu vi volas
eniri tien? Estas malpli varme.

ĴAŬFREDO
(rapide).
Se vi permesas, restas ni ekstere.
(Mallaŭte al *Tristano*).
Ĝi estas pli senriske.

JOLANTO

(al *Tristano*, kies manon ŝi ankoraŭ tenas).

Via mano

varmega estas; mi la pulson sentas.
Vi certe de la varmo tre suferis;
— vi soifiĝis. Mi alportos vinon.
(Ŝi eniras en la domon.)

TRISTANO.

Ho, kiel bela! — kiel puran, dolĉan,
amindan piegecon ŝia vido
montras al ni! kaj kia voĉo!

ĴAŬFREDO.

Vere,

vi estas prava, — oni ja obeus
ŝin nepre kiel Dion; vere ĉarma
ŝi estas, — certe de nobela raso!
Sed tamen, — prudenteco estas devo.
Ne trinku vinon, kiun ŝi alportos!

TRISTANO.

El ŝia mano mi volonte trinkus
eĉ mian morton!

JOLANTO
(revenas).

Jen la vino! ofte
ĝin trinkas mia patro; vi ĝin provu.

TRISTANO
(trinkonte).

Fraŭlino bela! Jen, al via sano!
(Li trinkas).

JOLANTO.

Vi verŝu vinon al amiko via;
mi serĉos por vi fruktojn, — ĉu daktilojn,
ĉu pomojn aŭ vinberojn, — laŭ deziro.

(Ŝi kolektas en la ĝardeno fruktojn, kiujn ŝi
metas en korbon sur la tablon.)

TRISTANO
(prezentas pokalon al Ĵaŭfredo).

Jen trinku!

ĴAŬFREDO.
Vi nenion sentas do?

Nenian — ŝanĝon?

TRISTANO.
Ne, — vi trankviliĝu.

ĴAŬFREDO.
Ĉu estas vino? (Gustumas). Dio! Malvaziĝo!
La Reĝo mem pli bonan ne posedas!
Mi trinkos ĝin, — sur via respondeco.
(Li trinkas).

Ho kiel bona vino! Certe, tio
ja pravas, ke ĉi ĉio estas prave!

JOLANTO
(reveninte).

Jen tiujn fruktojn ĉi; vi nun bonvolu!
Mi metas ilin sur la tablon.

ĴAŬFREDO

Bela
kaj ĉarma sinjorino, ni vin dankas!
Vi jam satigis nin per nobla vino,
— tiel bonega, ke ni nun komprenas,
ke ni vizitas tre nobelan domon.
Sed vino kaj beleco naskas kanton:
du vortojn do vi aŭdu malsevere,
per kiuj mi en versoj al vi diros
respektajn sentojn, varmajn dankojn niajn.
(Li prenas sian citron kaj, antaŭludinte mallonge,
recitas la sekvantan poezion, akompanante ĝin laŭ
anapesta ritmo.)

Per flugo forta,
pereoporta,
la falko ja distingiĝas
— sed en la valo
la najtingalo
per dolĉa kanto montriĝas,

— la kavaliro
per saĝa diro,
per venko en aventuro;
— sed per la sono
de dolĉa tono
koniĝas la trubaduro.

(Ŝanĝante la ritmon.)

Ĉar ofte li fremdan hejmon eniras
entruda li povas ŝajni,
— li tial per lerta kanto deziras
la korojn de l' gastoj gajni.
Se tiam la nobla, bela mastrino
pokalon al li prezentas,
noblecon de l' domo per nobla vino
kaj ĉarma ricevo li sentas.

(Li finas per forta akordo.)

JOLANTO.

Vi kantas ĉarme; tre malofta estas
tia lerteco.

TRISTANO.

Li tre fama estas
ĉe l' junaj trubaduroj de la lando.

JOLANTO

(al *Tristano*).

Ĉu ankaŭ vi kantadan donon havas?

TRISTANO.

Ho, mi nur lia instruato estas!
Permesu tamen, — afableco via
min kuraĝigas, danki vin laŭ povo.
(Li antaŭludas al ĉiu strofo per kelkaj akordoj
sur la citro.)

Mi longe, vane, tra la rond'
de la senluma, trompa mond'
serĉadis pacon, — ho, mi malsaĝulo!
— Mi venis nun al la renkont'
de ĝi, tra tiu nigra mont',
en bela valo, ĉarmo de l' okulo.

Ĉio ripozis! Birda ĥor'
ne jam parolis al la kor',
— ili silentis ĉiuj sur la branĉo,
— kaj ĉirkaŭ de l' beleta dom'
ne montris sin eĉ unu hom':
nur ĉie trankvileco de dimanĉo!

Ĉar jen, — simila al prinĉin'
ensorĉigita de fein',
vi dormis, belulino! — Bonodora

ĉe l' arbetoĵo ĉiu roz'
dormeti ŝajnis, — la ripoz'
ĉirkaŭis vin en la ĝardeno flora.

Dormadi ŝajnis la aer',
kaj en la forno la fajrer',
kaj ĉe l' arbaro ĉiuj palmoj revis;
ĉar ĉio vivis nur per vi,
— beleco, lumo, sunradi',
dum via dormo ankaŭ dormi devis.

Sed vi vekigis, — ho ĉiel'!
— jen nova lumo, nova hel'
vekiĝis ĉiuflanke ĉe l' naturo!
Vi do akceptu, rozulin',
admiron ĝojan kaj senfin'
de l' flora valo kaj de l' trubaduro!

JOLANTO

(al *Tristano*, post paŭzo, dum kiu ŝi sidis, apogante
la kapon en la mano).

Pruntu al mi la citron!

(Antaŭludinte, ŝi akompanas sin per kelkaj
akordoj.)

Gloro, honoro
estu al homo,
kiu ĉe l' koro
portas al domo
bonan konsilon per penso aŭ mito!
Ĉien lin sekvas nobla profito.

Plej do honora
estas la viro,
kiu per glora
sia inspiro
portas la kanton en la dometon!
Plej ni honoru noblan poeton!

Kontraŭ la blovo
grava de l' sorto,
kontraŭ la povo
velka de l' morto,
kontraŭ la prema melanĥolio,
helpas konsolo la poezio.

Sed mi konfesas,
fremda sinjoro:
dubo nun presas
min ĉe la koro;
ne mi komprenas, kion vi diris:
fremdaj la vortoj min preteriris.

Tiel birdeto
 fremda alvenis
 ĉe l' arbareto,
 — ne mi divenis,
 ĝin aŭskultante, kion ĝi diris;
 tamen la kanton ja mi admiris.

Vane mi provus
 sekvi la sonon,
 ne mi ja povus
 trovi la tonon
 tiel donantan al la animo
 revajn flugilojn por flugi sen limo.

ĴAŬFREDO

Ho, poezie!

TRISTANO
 (al *Jolanto*).

Vi min ĵus komparis
 al fremda birdo. Al ĉielo plaĉu,
 ke mi fariĝus birdo la plej eta
 en la ĝardeno, — ke mi restus tie
 dum tuta mia vivo, — ke mi aŭdus
 nur vian ĉarman voĉon!

ĴAŬFREDO.

Vi pardonu,

nobela sinjorino, la demandon; —
 admiro min devigas fari ĝin.
 Vi malproksime de la mondo vivas
 neniŭ aŭdis ĉe l' nobelularo
 pri viaj ecoj, virtoj kaj talentoj.
 Kiuj do estas via familio
 kaj via patro?

JOLANTO.

Ĉu vi lin ne konas?

Mirinde! Ja neniŭ venas tien,
 kiu ne konas lin!

ĴAŬFREDO.

Sed lia nomo?

JOLANTO.

Li nomas sin Raimbaut'.

ĴAŬFREDO.

Raimbaut'? li certe
 ja estas kavaliro?

JOLANTO.

Kavaliro?

ĴAŬFREDO.

Ĉu li militas? — havas spronojn orajn?
 — Kion li faras nun?

JOLANTO.

Mi ĝin ne scias.

ĴAŬFREDO.

Kiel li tie gardas vin severe?

JOLANTO

(mirege).

Severe?

ĴAŬFREDO.

Nu do, sole!

JOLANTO.

Ho, ne sole!

Vi eraregas!

ĴAŬFREDO

Vi ja estas sola!

JOLANTO.

Mi estas sola nun, — vi estas prava.

Mi ne komprenas tion. Ja kutime

ĉeestas ĉiam iu. — Vi atendu!

Bertrando certe vin salutos ĝoje.

(Ŝi eniras en la domon).

ĴAŬFREDO.

Ni nun do baldaŭ vidos, kies domo

kaj valo estas! Sed mi tre suspektas,

ke ĉio ĉi sekreto ia estas,

kaj ke la posedanto de la valo

ekkoleriĝos, ĉar ni venis!

(Montrante la eniron.)

Vidu,

la pordon oni zorge kaŝis jen

sub ŝtonoj kaj muskaro, — netrovebla

ĝi estas certe ĉe la ŝtonegaro.

Nun vi ne iru for de l' pordo! — Mi

atendos nur, ĝis oni venos. Tiam

mi iros tra la monto, kaj mi gardos

ĝian eliron por la forirado.

Mi eble kolektigos vasalaron,

kaj, se mi nur suspektos malfeliĉon,

mi tuj revenos. — Ĉu vi aŭdis min?

TRISTANO

(distrece).

Jes, iru, iru!

ĴAŬFREDO.

Ho, vi revas ĉiam!

— vin ensorĉigis tiu belulino.

TRISTANO.

Ne, mi nur malsaniĝas. — Mia kapo

turniĝas. — Ŝajnas al mi, ke la valo
estas la celo, kiun tiel longe
mi serĉis, — kaj ke mia glordeziro
ripozas tie ĉi.

ĴAŬFREDO.

Vi ne forgesas,
ke mia reĝo vin atendas baldaŭ!

TRISTANO.

Ho, via reĝo! — Kion mi deziras
de via reĝo? — Eble mi petegos
ĉe li provincon, kiu estas mia
per la venkinta glavo, — kaj edziĝos,
por gajni ĝin, kun lia reĝidino,
dum tie ĉi

ĴAŬFREDO.

Vi ne daŭrigu! Vi
ja freneziĝas! Vi tre bone scias,
kion vi devas fari! Vi deliras
nur, sorĉigita! Vi vekiĝu do!

TRISTANO.

Se mi vekiĝi povus, ĉu mi estus
do sorĉigita?

ĴAŬFREDO.

Haltu!

(*Jolanto revenas.*)

JOLANTO.

Ĉu vi estas
ankoraŭ tie?

ĴAŬFREDO.

Mastron de la domo
ni nur atendis.

JOLANTO

(malĝojete).

Sed mi ne lin trovis.
Mi vokis, sed neniuj aŭdis min.

TRISTANO.

Ĉu li do venos baldaŭ?

JOLANTO.

Certe, jes;
sed oni faras nun la vinrikolton;
mi partoprenas al ĝi ja kutime,
sed ĉiam iu restas apud mi.

ĴAŬFREDO.

(kaŝe al *Tristano*).

Vi restas?

TRISTANO.

Jes.

ĴAŬFREDO.

Mi agos laŭ promeso.

(Li foriras kun saluto al *Jolanto*, kiu al ĝi ne respondas.)JOLANTO
(aŭskultante).

Amiko via ja foriris.

TRISTANO.

Baldaŭ

li tien ĉi revenos. — Sed mi devas pardonon peti pro malprava faro.

Mi prenis al vi ĵus, dum via dormo, juvelon vian, kiel memoraĵon.

Jen!

JOLANTO.

Donu!

(Tristano donas al ŝi la juvelon el la tria sceno.)

Ĉu ĉi tio estas mia?

TRISTANO.

Mi kredas, jes.

JOLANTO.

Ne, mia ĝi ne estas.

— Nu, Martho eble scios!

Ŝi metas la talismanon sur la tablon.)

TRISTANO.

Nun, mi petas,

anstataŭigu por ĝi ruĝan rozon:

ĝi estos al mi kiel bildo kara

de vi, kaj mi ĝin tial ĝoje portos.

JOLANTO.

Rozon? Volonte.

(Ŝi deŝiras kaj donas al li rozon, sed blankan.)

TRISTANO.

Ho, ĝi estas blanka!

Vi donu ruĝan, brilan kiel vi!

JOLANTO.

Mi ne komprenas. Ruĝan?

TRISTANO.

Tiun ĉi.

JOLANTO.

Prenu ĝin mem!

TRISTANO.

Ne, mi la vian gardos,
 ĉar vi elektis ĝin. Vi estas prava;
 mi devas vian guston ja respekti.
 — La blanka rozo, kies florkaliko
 revantan, palan ruĝon kaŝas, ĉarma
 de tiu valo estas ja simbolo.
 — Vi donu al mi duan blankan rozon!
 Mi portos ilin ambaŭ ĉe l' ĉapelo,
 kiel koloron plej de vi amatan.

JOLANTO

(deŝiras kaj donas al li rozon, sed ruĝan).
 Jen rozo. Ĉu vi volas diri tian?

TRISTANO

(surprize).

Mi ja demandis *blankan!*

JOLANTO

Kia estas

do tiu ĉi?

TRISTANO.

Ĝi . . . (Mallaŭte.)

kion mi divenas!

(Laŭte, kolektinte kelkajn rozojn kaj montrante ilin,
 kune kun la du unuaj.)

Vi diru, kiom mi da rozoj tenas?

JOLANTO

(volante ilin tuŝi, kaj ne levante
 la okulojn).

Nu, donu ilin!

TRISTANO.

Ne, sen ilin tuŝi!

JOLANTO.

Mi ja ne povas!

TRISTANO

(mallaŭte).

Ve! ŝi estas blinda!

(Laŭte, ŝanceliĝe.)

Mi kredis, ke ĝi estas eble.

JOLANTO.

Ne!

Se oni volas koni figuraĵon
 aŭ nombron de l' objektoj, oni devas
 ja palpi ilin!

TRISTANO

(konfuzite).

Jes, vi estas prava!

— sed tamen —

JOLANTO.

Tamen? Kiel? diru nur!

TRISTANO.

Mi volis diri nur ke la objektoj
per la koloro ankaŭ malsimilas;
— la floroj, kaj la ŝtofoj, estas tiaj.

JOLANTO.

Vi volas diri: per malsamaj formoj,
ĉu ne?

TRISTANO.

Ho ne! pri tio mi ne pensis!

JOLANTO.

La florojn koni estas ja facile.
La rozo estas ronda, delikata
kaj dolĉa kiel la vespera vento,
kaj bonodora. — Ĉu do estas eble
konfuzi la dianton kun la rozo?
Ĝi ja odoras forte, kiel vino!
Kaj do la kakti! Ĝiaj akraj pintoj
ja pikas kiel vintra neĝblovado!

TRISTANO

(mallalte).

Mirinde!

(Laŭte.)

Ĉu neniu al vi diris

ke jam en malproksimo oni povas
objektojn koni per — per la vidado?

JOLANTO.

En malproksimo? Jes! Birdeton, kiu
sur la tegmento sidas, mi ja konas
per ĝia kanto; mi la homojn konas
per la parolo; — la ĉevalon, kiu
min ĉiutage portas, per la sono
de l' paŝo kaj de l' bleko. — Sed vidado?
Pri tio mi neniam aŭdis. — Kio
vidado estas? — Diru! — Eble arta
aŭ simpla ilo por ekzamenado?
— Mi ĝin ne konas. — Ĉu vi povas diri
al mi la ecojn de l' vidado?

TRISTANO.

Dio!

Ŝi mem ne scias, ke ŝi estas blinda!

JOLANTO

(post paŭzo).

El kio lando vi do venis? Vortojn
vi uzas, kiujn mi ne konas, — ofte,
— kiel mi diris jam, — mi ne komprenas
parolon vian. Ĉu do via valo
tre malsimilas tiun ĉi? Ho, restu,

se vi bonvolas, por instrui min
pri ĉio, kion mi ne konas nun!

TRISTANO.

Ho bela, juna sinjorino! ne!
Pri tio mi ne povas vin instrui!

JOLANTO.

Se vi nur volas, vi kredeble povos;
ĉar oni diras, ke mi lerte lernas.
Mi lernis jam de multe da personoj
venintaj tien, multe da ideoj.
Vi provu nur. Mi certe ne eraras,
vi volas mian bonon. Via voĉo
ja estas dolĉa. — Vi ja ne rifuzos!
Parolu nur. Atente mi aŭskultos.

TRISTANO.

Ho ve! malmulte helpos la atento!
— Nu, vi bonvolu diri al mi jenon:
Vi eble jam rimarkis, ke la partoj
de l' homa korpo ĉiuj havas uzon.
Vi prenas per la manoj la objektojn,
kaj la piedo, kiel eta ajn,
vin portas ĉien, laŭ deziro via.
Per la oreloj iras ĉiuj sonoj,

ĝis ili al la cerbo kaj la koro
alvenas; — per la lipoj vi parolas;
— la brusto respiradas, kaj facile
entiras kaj forpelas la aeron.

JOLANTO.

Mi tion ĉi rimarkis. Nur daŭrigu.

TRISTANO

Nu, diru al mi, kial do vi kredas
ke la Diaĵo kreis — la okulojn?
Por kia uzo vi do utiligas
la stelojn du, lumantajn tiel klare,
ke ili fremdan lumon nur malŝatas?

JOLANTO.

(tuŝas siajn okulojn kaj
pripensas iomete).

Por kia uzo — mire vi demandas!
Jes! vere, mi pri tio jam ne pensis!
— Ho, nun mi scias! estas ja facile!
Vespere, kiam mi laciĝis, dormo
peze sidiĝas sur okulojn miajn
kaj tuj eniras tra la tutan korpon,
simile al la sento el la fingroj.
Do indan uzon la okuloj havas!
— Kaj plue, ĉu vi ne rimarkis mem

alian uzon de l' okuloj? Iam
 — mi plantis ĵus rozujon, — ia besto
 alkuris kaj min mordis en la fingro.
 Mi ploris tiam de doloro. — Iam
 mi longe ĉagrenadis; mia patro
 ne povis veni, kaj mi lin atendis
 tre longatempe vane; — fine li
 alvenis, tiam mi de ĝojo ploris.
 La ploroj helpis tiam mian koron
 kaj ili ja elfluas de l' okuloj.
 — Vi tiel do facile nun komprenas,
 ke la Diaĵo saĝe al ni donis
 okulojn. — Dormon ili al ni donas,
 per ili la doloro ploras, kaj
 la ĝojo ankaŭ!

TRISTANO

Ho, pardonu min!

Demando mia estis malpiega.
 Vi havas klaran vidon en la koro,
 vi tial ne bezonas korpan vidon
 per la okuloj kaj la lumo. — Diru,
 ĉu vi ĉe nekonata raso naskis
 kun superhomaj ecoj nekonataj?
 — Vi vivas sola tie ĉi; la valo
 ŝajnas magia kreitaĵo. Eble

vi venis tien el la Oriento
 kun aro da Perioj? Magiisto
 vin el Hindujo eble tien portis? —
 Ho bela nekonatulino! diru! —
 Se vi virino homa estas vere,
 kaj se vi homajn sentojn vere havas,
 akceptu senkolere oferdonon
 de mia koro, — aŭdu la promeson
 kiun mi faras; — mi por ĉiam gardos
 en la animo viajn noblajn trajtojn,
 neniu ilin iam plu forigos!

JOLANTO

(post paŭzo).

Timinda estas via parolado!
 Ĉe kiu majstro vi do lernis arton
 animon ravi per enigmaj vortoj?
 Mi estas kiel sola eraranta
 per vojo nekonata. Tamen ĉio,
 kion vi diras, ŝajnas al mi dia
 kaj dolĉa, — diru al mi ion plu!
 — Ho ne, silentu! Mi aŭskulti volas
 en mia penso, kion jam vi diris,
 — pri kio mi kaj ĝojas kaj malĝojas.

ĴAŬFREDO

(rapide enirante, mallaŭte al *Tristano*).

Mi malproksime vidis militaron; —
memoru, — ni ne estas plu ol du.

TRISTANO

(al *Jolanto*).

Fraŭlino bela, mi foriri devas!

JOLANTO.

Ho, kial vi foriras?

TRISTANO.

— Mi revenos,
— revenos baldaŭ, — jam hodiaŭ! — Volu
mezuri mian kreskon per la mano!
Vi tiel pli facile min rekonos,
tuj kiam mi revenos.

JOLANTO.

Kial do?

Ĉu mi ne scias, ke vi estas plej
altkreska? Via voĉo subeniras
al mi, venanta kiel de l' ĉielo!
Ĉu mi ne konos vian voĉon? — Ho
neniu kiel vi parolas! — Certe,
neniu sono kaj neniuj kanto,

neniu instrumento de muziko
en tiu mondo iom ajn similas
al via dolĉa kaj fortika voĉo!
Mi konos vin eĉ inter miloj, fidu

TRISTANO.

Adiaŭ do, — ĝis baldaŭ la revido!

JOLANTO.

Donu la manon al mi! — Vi ja certe
revenos? — Mi atendas vin, — memoru!

TRISTANO

(kisas genufleksante ŝian manon).

Ho, vi ne dubu, ke mi baldaŭ venos!
Min tiros tien ĉi la koro. — Eĉ
dum mi foriras, miaj pensoj restos
en tiu valo, — tuta mia vivo
vin ĉiam ĉie maltrankvile serĉos.
Ĝis la revido!

(Li foriras kun *Ĵaŭfredo*, kiu jam pli frue
stariĝis apud la sekreta pordo.)

JOLANTO,

(aŭskultante).

Jen li iras! Jen

tra tiu monto, kie fremdaj paŝoj
jam ofte sonis, li foriras! — Ho,

mi plu ne aŭdas lin! — Jes tamen — jen
 refoje, — nun silentis ĉio! — Ĉu
 li tien ĉi revenos? Se li venus
 nur unufoje, kiel vizitantoj
 ja ofte faris? — Ne, li ja promesis,
 li diris, ke li venos jam hodiaŭ!
 Sed jen la roso de vespero falas.
 Hodiaŭ li ne povos. Eble morgaŭ
 Ho, kiel sola mi nun estas — — —!

KVINA SCENO.

JOLANTO. MARTHO. — Poste REĜO RENÉ kaj
 EBN JAHIA. — Laste ALMERIKO.

MARTHO

(revenas de post la domo kaj rapidiĝas,
 vidante *Jolanton*).

Kara

infano! — Kiel? — vi vekigis? — Diru!

JOLANTO.

Ho, Martho! fine vi do venas! — Kie
 vi estis?

MARTHO.

Sur la kampo, — sed respondu!
 kiu, — kiu vin vekis?

JOLANTO.

Ja mi mem.

MARTHO.

Vi mem?

JOLANTO.

Nu jes! mi tion devas kredi.
 — Sed vi ne scias ja! Fremduloj iuj
 foriris ĵus —

MARTHO.

Fremduloj? Vi ja ŝercas!

JOLANTO.

Ne, du fremduloj, tute nekonataj
 en tiu valo, kaj ĝin nekonantaj.
 Domaĝe estas, ke vi jam foriris.

MARTHO.

Ne plu deliru! — Kara do! — Fremduloj —
 De kiu, — ne, mi volas diri: kiel —

JOLANTO.

De kie ili venis? Mi ne scias.
 Vi diris, ke mi per demandoj ne
 enui devas niajn gastojn.

MARTHO

Diru

do kiuj estis?

JOLANTO.

Mi ne scias.

MARTHO.

Vi

do estis sola?

JOLANTO.

Mi vin vane vokis.

MARTHO

(flanke).

Ĉu estas eble? Dio!

(Laŭte.)

Sed rakontu!

JOLANTO.

Ho, Martho! nesimilaj ili estis

je ĉiuj ajn, kiuj vizitis nin,

— unu precipe el la du! Li certe

el fremda, tre malsama lando venis

en nian valon. Lia parolado

potenca estis, kaj dolĉega tamen.

(*Reĝo René* kaj *Ebn Jahia* alvenas nerimarkite
tra la sekretan pordon kaj restas atente ĉe
la fundo.)

Li min salutis per poemo! — Martho,

poemo stranga, nova kaj mirinda!

Ĝi naskis plorojn en okuloj miaj,

malgraŭ ke nur duone mi komprenis.

MARTHO.

Ho, trankviliĝu!

(Flanke.)

Kio do okazis?

(Laŭte.)

Sed diru nun, pri kio li parolis?

JOLANTO.

Pri multaj nekonataj mirindaĵoj.

Li priparolis multon da objektoj,

pri kiuj mi pli frue ne eĉ revis.

Li diris, — sed mi ne komprenis tion,

— li diris, ke l' objektojn malproksimajn

ni konas per vidado.

MARTHO.

Ho ĉielo!

JOLANTO.

Ĉu vi komprenas?

MARTHO

(vidas la alvenintojn).

Dio! Jen la reĝo!

REĜO

(flanke al *Ebn Jahia*).

Kion mi aŭdas! Ĝi jam scias ĉion!

(Iras antaŭen kun la kuracisto.)

Filino mia!

JOLANTO

(ĉirkaŭprenas lin).

Kara mia patro!

Ĉu vi alvenis?

REĜO.

Jes, kun via majstro.

JOLANTO.

Li ankaŭ? kie?

(Ebn Jahia donas al ŝi la manon.)

Estu bonveninta!

REĜO

(al *Martho*, dum *Ebn Jahia* parolas kun *Jolanto* kaj, nerimarkite de ŝi, ekzamenas ŝiajn okulojn).
Kio okazis?

MARTHO.

Dio! Mi ne scias!

Dum ŝi dormadis, ni, kredinte certe,
ke ŝi ne mem vekiĝi povas, iris
sur la kamparon. Sed dum tiu tempo

— ŝi diras tiel, sed neeble ŝajnas, —
nekonatulo tien ĉi alvenis.

REĜO.

Mi nezorgulo! Mi forgesis fermi
la pordon, dum mi sekvis Ebn Jahia'n
Nu, la fremdulo — ?

MARTHO.

Li kun ŝi parolis,
— se mi komprenis bone ŝiajn dirojn
konfuzajn, — iom pri blindeco ŝia.

REĜO.

Blindeco ŝia! Estas decidite
ĉe la ĉielo, ke ŝi ĉion sciuj!
Nu, estu!

(Faras signon al *Ebn Jahia*.)

Ebn Jahia! Ĉu vi aŭdis?

EBN JAHIA.

Jes, la okazo helpis nin. Fremdulo
ŝin vekis. Mi la talismanon trovis
sur tiu tablo. — Sed ŝi nur konfuze
komprenis ĉion. Mi insisti devas,
por ke vi tamen, laŭ promeso, diru
ĉion al ŝi —

REGO.

Mi tion jam decidis.

(Proksimiĝas al *Jolanto*, kiu dume parolis
kun *Martho*).

Filino, vi aŭskultu min atente!

Mi plu ne kaŝos, ke okazo grava

de vi postulas plenan sinposedon.

Ĉu vi do volas min trankvile aŭdi,

— trankvile porti la doloron, se
neatendite ĝi alvenas?

JOLANTO.

Patro,

parolu nur! Per via kara buŝo
volonte mi ekaŭdas ĉion!

REGO.

Aŭdu,

mia Jolanto! Mi ne scias, kion
la fremda viro diris; tamen ŝajnas,
ke li instruis vin pri manko iu,
ĝis nun al vi kaŝata; — sciu nun,
ke al vi mankas ilo tre potenca
por koni tiun mondon, — la *vidado*.

JOLANTO.

Li tion diris, sed mi ne komprenis.

REGO.

Do sciu, ke ekzistas mira forto,
nomata *lumo*, kiu de l' ĉielo
al ni malsupreniras nevenkeble.
Ĝi donas al objektoj novan sencon,
novan signifon kaj valoron novan,
kaj iras ofte kune kun la varmo.
Ni ĝin komprenas nur per la okuloj.
Nur per la vida povo de l' okuloj
ni povas vere senti la vastecon
de l' universo, kiun Dio kreis,
kaj lian saĝon, amon kaj justecon.
La mondon, kiun ĝis nun vi divenis
nur malfacile, la okuloj *vidas*,
ni tiel konas ĝin laŭ vera formo.

(Kortuŝiĝe.)

Viaj okuloj perdis la vidadon.
Belecon kaj lumecon de la mondo,
karulineto, vi neniam konis!
Kaj nia zorga flego malperfekte
kompensis tiun ĉi kripoleon vian.
Ni povis nur vin helpi, kaŝi al vi
la kaŭzon de la nekomprenebleco
de tiu mondo, kie vi vivadis.

JOLANTO.

Ho, mia patro! viaj vortoj estas
 nekompreneblaj! Ĉu mi do ne konis
 la universon, kiel Dio mem
 ĝin kreis? Ĉu vi kaŝis ĝin al mi?
 Kiel vi povas tion diri? Ĉiam
 mi konatiĝis ja kun mia Dio
 per l'universo! — Ĉu la vento ne
 per ĝia forto kaj dolĉeco, — ĉu
 la varmo kaj la floroj de l'somero,
 la arboj, eĉ la ŝtonoj kaj la ondoj
 de la rivero, — ĉu la birdaj ĥoroj,
 la tero mem, sur kiu mi vivadis,
 ne ĉiam min instruis pri l'Diaĵoj?
 Kaj ĉu mi ne per vi, per ĉiuj homoj
 bonvolaj kaj bonkoraj, ĉiam lernis
 kompreni la intencon de l' Kreinto?
 Mi mem ja estas nur per lia volo,
 kaj kien ajn mi turnas min, mi aŭdas
 la saman voĉon ĉie, parolanta
 per malsimilaj buŝoj de la homoj,
 per miaj propraj pensoj kaj ideoj,
 pri Dio, kiu kreis universon.

REGO.

Ho, Ebn Jahia! tiun belan kredon
 ni nun malkvietigis!

JOLANTO.

Diru ankaŭ:

Ĉu mi per la okuloj lin komprenos?
 La fremda viro, kiu venis tien,
 kaj kies vortoj min profunde trafis,
 — li ankaŭ ja parolis pri vidado.
 Kio vidado estas? Ĉu mi povos
 do vidi lian voĉon? La vidado
 per la okuloj eble povas sekvi
 la ŝanĝan kanton de la najtingalo,
 kiel mi ofte provis fari? Eble
 la kanto estas floro netuŝebla,
 kies odoron nur mi konas?

REGO.

Ve!

Per ĉiu vorto vi doloron vekas.
 Je mi vin fidu! Lasu nur la tempon
 klarigi, kion vi ne jam komprenas!
 Nur sciu, ke l' espero al mi restas,
 — per kiu mi vivadis ĝis hodiaŭ, —
 ke vi la vidon povos reakiri,

kaj ree povos ĝui je la lumo.
 Jen via nobla majstro Ebn Jahia
 preparis jam per longa laborado
 la horon, kiun li por ni difinis.
 Ĝi nun ĉeestas, ho filino mia!
 Je li vin fidu. Vi kun li eniru
 Martho vin sekvos. . . . Vi enfalos tie
 en sensenteco, kaj, se Dio volas,
 el tiu sensenteco vi vekigos

JOLANTO.

Nun, kial, kara patro, vi ektremas?
 Ĝojiĝu nur, la horo ja ĉeestas,
 de vi jam tiel longe preparata!
 Ĉu timas vi, ke ĉio ne sukcesos?
 Sed tiam mi ja restos, kiel nun,
 al vi filino kara kaj amanta;
 neniam mi pri mia sorto plendos!
 — Permesu min eniri!

REĜO,

Ho, Jolanto!

JOLANTO.

Vi nur ne timu! Mia saĝa majstro
 sukcesos plene, — mi ĝin certe scias!
 Ŝajnas al mi, ke jam mi bone konas

la miran forton kaj mirindan povon,
 kiun vi nomas lumon, — jam hodiaŭ
 ĝi trovis al mi vojon. Jes, dum li
 ĉeestis, tiu fremda alvenanto,
 ŝajnis al mi, ke nekonatan movon
 mi sentis ĉe la koro; ĉiu sono
 de lia voĉo ŝajnis melodio
 de bela, ĝis nun neaŭdita kanto.
 — Vi diris, ke la lumo estas forta
 kaj rapidega, — kaj al ĉio donas
 signifon novan, — kaj kun varmo venas?
 Kun varmo de la koro? ho, ĉu ne?
 Se tio, kion vi la lumon nomas,
 la koron ĉarmas, io al mi diras,
 ke mi posedos ĝin hodiaŭ jam!
 Sed certe, ĝi ne loĝas ĉe l' okuloj!
 Ĝi restas en la brusto, tre profunde.
 Memoro ĉarma ĉe l' animo restas
 de l' lumo, kiun mi hodiaŭ sentis,
 — mi tiun lumon ĝoje nun ricevu!
 (Ŝi eniras kun *Martho*, kiu dume proksimiĝis.)

REĜO

(al la *kuracisto*, kiu volas ŝin sekvi).

Atendu, Ebn Jahia! Ĉu vi povas
 kompreni tion? — Kiu povas esti

la fremda viro, kiu ĉarmis ŝin?
Kion mi devas pensi pri ĉi tio?
Parolu!

EBN JAHIA.

Ne facile estas, juĝi
la ŝanĝojn de la junulina koro.
Mia kalkulo ŝajnas konfuzita.

REGO.

Klarigu —

EBN JAHIA.

Nu, se ŝi ripozon trovas
ĉe l' revo pri l' fremdulo, — ĝi videble
okupas ŝian penson, — tre mi dubas
pri la sukceso de l' operacio,
— la fundamento mankas. Se kontraŭe
edziĝo de ideoj havas lokon,
se ambaŭ pensoj serĉas realiĝon
kaj kune vivas nun en ŝia koro,
al mi espero restas, — sed ne granda.
(Li eniras.)

REGO.

Ho Dio! Kiu venis do? Bertrando

ĝin eble diros —

(Almeriko eniras tra la sekreta pordo.)
Almeriko! vi?

ALMERIKO.

Leteron mi alportas.

REGO.

De Tristano?

(Malfermas ĝin.)

Jes ja, de li!

(Legas.)

Kion mi vidas? — Aŭdu!

Li rompas la traktaton, li deziras
nuligi ĝin!

ALMERIKO.

Nuligi ĝin?

REGO

(daŭrigas la legadon).

Mirinde!

Li mem konfesas, li ne havas rajton
ĝin fari, — donas al mi plenan povon, —
sed — li rifuzas nur la reĝidinon!

ALMERIKO.

La maltimulo!

REĜO.

Almeriko! Ve

La sorto nun refoje frapas min!
 Ho, certe, tio estas antaŭsigno
 de malsukceso ankaŭ tie ĉi!
 Kiom mi revis pri la edziniĝo
 de la princino! — vane mi ĝin fondis
 sur la espero, ke Jolanto mia
 regajnos sian vidon! — Unu revo
 pereis nun, alia, — sed ne decas
 per plendoj mem min humiligi. Dio
 konduku min laŭ lia volo! — Kiu
 alportis la leteron?

ALMERIKO.

Kavaliro

vasalo de Ĵaŭfredo, — ĉar Tristano
 loĝas ĉe li.

REĜO.

Li loĝas ĉe Ĵaŭfredo?

Eble Ĵaŭfredo povos — Kio estas?
 Ĉu mi batalon aŭdas en la groto?

ALMERIKO

(iras al la pordo sekreta).

Perforte oni venas!

REĜO.

Ha! perforte?

ALMERIKO.

Ni havas nur malmulte da soldatoj. —

REĜO.

Tiru la glavon! Oni min ne mokos!

SESA SCENO.

REĜO RENÉ. ALMERIKO. — TRISTANO en
 brilanta armaĵo, kun *vasalaro*. — Pli malfrue
 ĴAŬFREDO kun *vasalaro*.

(Dum tiu ĉi sceno, la vespero komencas ruĝigi la
 valon kaj la malproksimajn montojn, kiuj restas
 tiel ĝis la fino de l'peco).

TRISTANO.

Vi cedu! Via vasalaro estas
 militkaptita jam! Kapitulacu!

REĜO.

Senhontegulo! kial vi perfortas
 paceman lokon? Halt'! aŭ mia venĝo
 vin trafos, se vi ne respekton konas!

TRISTANO.

Ŝparu la vortojn! Timon mi ne sentas!

Mi kredas bone, ke demono regas
 en tiu valo. Sed pli forta povo,
 animas min, ol ciaj artifikoj.
 Se ci spiritojn de l' aero vokas,
 sorĉante ilin per magio, — sciu:
 La Sankta Moŝto benis mian glavon;
 en Avignono abatino pia
 la skarpon brodis, kiun nun mi zonis; —
 kaj mi kuraĝon portas en la koro,
 per kiu jam Georgo Sankta venkis.

REGO.

Ha, frenezulo! Kion vi do volas?

TRISTANO.

Respondu! Ĉu ci tiun valon regas?

REGO.

Mi certe regas tiun valon, — regas
 eĉ iom plu. — Vi mem do kiu estas?

ĴAŬFREDO

(eniras kun *vasalaro* — mirante).

Reĝo René'?

(Genufleksas.)

Pardonu, Reĝa Moŝto!

TRISTANO

(flanke).

Reĝo René'?

REGO.

Ĉu vi, Ĵaŭfredo? — kune
 kun malamiko mia?

ĴAŬFREDO.

Vi pardonu!

Li rapidiĝis tro; — mi malfruiĝis.

REGO

(al *Tristano*).

Nun diru vian nomon!

TRISTANO.

Jen: Tristano
 de Vaudemont'. Vi eble konas ĝin.

REGO.

Tristano?

(Al *Ĵaŭfredo*.)

Ĉu ĝi estas vere?

ĴAŬFREDO.

Certe!

REĜO

(pripensinte).

Kaj vi jam venis tien ĉi hodiaŭ,
ĉu ne?

TRISTANO.

Jes, efektive, Reĝa Moŝto!
Okaze mi alvenis. Mi ne sciis,
ke vi sinjoro de la loko estas.

REĜO.

Nu, kial vi revenis?

TRISTANO.

Vi ja tion
jam scias.

REĜO.

Tute male! Vi parolu!

TRISTANO.

Vi volas trompi min; ĉar tiu valo,
floranta kaj mirinda, ja enhavas
plej belan mirindaĵon, — belulinon,
kiun ne ĉiuj trubaduroj povus
laŭ indo kanti, laŭ merito laŭdi.

REĜO.

Nu — tiu oelo — Vi daŭrigu! —

TRISTANO.

— faris

en mia koro nekontraŭstareblan
impreson.

REĜO.

Ĉu vi konas ŝian nomon?

TRISTANO.

Ne, sed ŝi portas sian nobelecon
en ĉiu gesto, vorto kaj mieno.

REĜO.

Kaj vi do ne rimarkis, ke dum ŝi
de la naturo bonojn nur ricevis,
ŝi malfeliĉe —

TRISTANO.

Ve! ŝi estas blinda!

Sed ŝia koro havas helan lumon,
pli brilan ol la sunradioj mem!

REĜO.

Ŝi estas blinda; kaj vi, malgraŭ tio, —

TRISTANO.

Mi ĝoje metas mian grafan kronon
en tiaj manoj.

REĜO.

Vere, mi kontesas
je l' sankta bildo en Clairvaux! vi estas
de l' valo la plej granda mirindaĵo.
Perforte vi ja volas almiliti
posedon propre vian, — kiun tamen
vi malrespekte puŝis for de vi!

TRISTANO.

Mi ne komprenas.

REĜO.

Sciu do: vin ĉarmis
tiel profunde ĵus — filino mia!

TRISTANO.

Via filino?

REĜO.

Certe, juna grafo!
Pri ŝi vi diris tamen ĵus letere,
ke vi rifuzas nun, je ŝi edziĝi;
por ŝi, vi havas tian malamegon,
ke Lorenlandon preskaŭ vi forlasus
al ŝia patro, nur por ŝin ne havi;
kaj tamen, vi ensorĉis ŝian koron
tiel profunde, ke mi dubas tre,
ĉu ŝi forlasus vin.

TRISTANO.

Ho, Reĝa Moŝto!
Ĉu estas vere? Viaj vortoj ĉarmas —

REĜO.

Kiel mi diris.

TRISTANO.

Kial do ŝi loĝas —

REĜO.

En tiu valo? Vi ĝin baldaŭ scios.
Vi ne suspektas, grafo, ke vi venis
en grava horo tien, — ĉar Jolanto,
filino mia kara, eble nun
eniros en eternan nokton, — eble
ŝi nun ricevos helan, klaran vidon.

TRISTANO.

Kion vi diras, Reĝa Moŝto?

REĜO.

Ĵus
Kordova kuracisto, Ebn Jahia,
decidis provi —

(Li proksimiĝas al la dometo).

aŭdu! Ŝajnis al mi
ke iu movis tie — ni aŭskultu!

Ŝi nun parolas! — Ho Tristano! Ŝi
parolas! — Ĉu la ĝojo aŭ doloro
inspiras ŝiajn vortojn? Iu nun
elvenas —

SEPA SCENO.

LA SAMAJ. — BERTRANDO. — Pli malfrue
MARTHO. — Laste JOLANTO kaj EBN JAHIA.

REĜO.

Nu, Bertrando, rapidiĝu:
ĉu estas bone?

BERTRANDO.

Mi nenion scias.

Li vekis ŝin, li finis la kuracon,
— mi time kuris for.

MARTHO
(eliras rapide).

Ŝi povas vidi!

REĜO.

Ho Martho! vidi —!

TRISTANO.

Ĉu do eble —?

MARTHO.

Jen

ŝi venas.

(*Ebn Jahia* eliras unue el la dometo, kondukante
Jolanton per la mano, kaj farante signon al la
aliaj personoj, ke ili malproksimiĝu. Ili montras
per muta ludo sian partoprenon al la sekvanta
sceno.)

JOLANTO.

Kien vi kondukas min?
— Ho Dio! kio estas? — tenu! — helpu!

EBN JAHIA.

Trankvile nur!

JOLANTO.

Ne, tenu min! — ho, haltu!
Mi tien ja neniam venis! — kion
mi devas fari? — tenu! — tenu min!
Ĝi proksimiĝas — ho, ĝi min timigas!

EBN JAHIA.

Jolanto, trankviliĝu! Vi rigardu
la teron, fiksas amikindon vian,
fideblan, kiu portas vin ankoraŭ.
Vi vidas jen ĝardenon vian propran.

H. Hertz. Jolanto.

JOLANTO.

Mian ĝardenon? Mi ĝin ja ne konas!
Mi vidas teruraĵojn nur — ho gardu!
ili ekfalas!

EBN JAHIA.

Nur ne timu! Tie
la daktilpalmoj staras, kies fruktojn
kaj foliaron vi ja konas.

JOLANTO.

Ne!

Mi ne rekonas ilin!

(Ŝi levas la okulojn.)

Kiel hela,
ho kiel alta estas tio! — Ĉie
ĝi staras ĉiufanke ĉirkaŭ mi!
Ĉu estas la spirito de l' Diaĵo?
Vi diris ja, ke Dio ĉie vivas!

EBN JAHIA.

La helo, kiun vi nun vidas, estas
la lumo. Dio estas en la lumo,
kiel en ĉio. — Tiun klaran bluan
ni nomas la ĉielon, kaj ni kredas,
ke Dio vivas tie. Genufleksu!
Levu al la ĉielo viajn manojn,
— preĝu al Dio!

JOLANTO.

Ho, sed mi ne scias,
kion mi devas diri! Oni ne
instruis min, kiel mi devas preĝi
en tiu nova mondo!

EBN JAHIA.

Diru tiel:

Nekomprenebla, sankta Dio! Ci
al mi parolis en la blinda nokto:
nun helpu min, ke mi je Ci konfidu,
kaj gvidu min en tiu luma vivo!

JOLANTO

(genufleksante).

„Nekomprenebla, sankta Dio! Ci
al mi parolis en la blinda nokto:
nun helpu min, ke mi je Ci konfidu,
kaj gvidu min en tiu luma vivo!“
— Jes, li min aŭdis, — mi ĝin bone sentas!
Li sendas al mi forton kaj konfidon.
Li sola restis, kiel mi lin konis,
intima, nevidebla!

EBN JAHIA.

Restariĝu,
kaj nun rigardu jen!

JOLANTO.

Ho, kiuj estas
la altaj aperaĵoj tie? diru!

EBN JAHIA.

Vi konas ilin.

JOLANTO.

Mi nenion konas!

REĜO.

(alproksimiĝas, kortuŝiĝe).

Rekonu min, Jolanto, — vian patron!

JOLANTO.

(ĉe lia brusto).

Ho, patro! — Jes, vi estas mia patro!
Jes, mi ja konas vian karan voĉon,
vian manpremon! Restu tie! Mi
bezonas helpon en la fremda mondo!
Mi ĉion perdis, kion ajn mi konis, —
ĉion, per kio mi feliĉe vivis!

REĜO.

Mi donos al vi kondukanton nun.

JOLANTO.

Kiun?

REĜO.

Jen iu staras kaj atendas!

JOLANTO.

Fremdulo tiu? Kiu do li estas?
Vi iam pri anĝeloj ja parolis:
ĉu li anĝelo estas de la lumo?

REĜO.

Vi konas lin. Vi ĵus kun li parolis.

JOLANTO.

Kun li? kun li?

(Metas la manojn antaŭ la okulojn.)

Ho patro, mi komprenas!

En tiu aperaĵo sin ja kaŝas
la dolĉa, forta voĉo, kiun mi
aŭdis hodiaŭ.

(Al *Tristano*, kiu alproksimiĝas.)

Ho, parolu! diru
nur unu el tiamaj viaj vortoj!

TRISTANO.

Ho, bela, juna sinjorino!

JOLANTO.

Aŭdu!

Ho aŭdu! — Jen per tiuj samaj vortoj

la lumo venis la unuan fojon
en mian koron, — kaj restadis tie!

TRISTANO

(ĉirkaŭprenas ŝin).

Jolanto! kara belulino!

REGO.

Benu

vin Dio, kies saĝon ni admiras!

PRESERAROJ.

La legantoj bonvolu antaŭ la legado korekti kaj pardoni la jenajn preserarojn, kaŭzitajn de troa rapidigo por pretigi la eldonon antaŭ la malfermo de l' Kongreso de Dresden:

Paĝ. 8, 7:a linio de malsupre, anstataŭ	Oho!
	legu Ho ho!
„ 12, 2:a „ supre, „	leteron
	legu letereton
„ 25, 14:a „ „ „	tion ĉi
	legu tiun ĉi
„ 32, lasta vorto, „ „	nervo
	legu nervoj
„ 36, antaŭlasta linio de l' paĝo „	forlasu
	legu forlasos
„ 54, la antaŭlasta linio de l' poemo de Tristano, anstataŭ	senfin'
	legu sen fin'
„ 58, 4:a linio de supre, „	Kiel
	legu Kial
„ 74 2:a „ „ „ „	silentis
	legu silentas

Paĝ. 75, 5:a linio de malsupre, anstataŭ De kiu
legu De kie

„ 76, antaŭlasta linio, forigu la du akuzativajn
n'ojn.

Plue, kelkaj ekkriaj punktoj forfalis dum la
presado (paĝ. 25, 8:a linio; fine de l' paĝo 27;
paĝo 73, 4:a linio; paĝ. 79, 5:a linio de supre).

Fine, ĉar mi tute ne intencas „pliriĉigi“ nian
karan lingvon je senutilaj vortoj, mi petas ke
oni legu:

paĝ. 15, 8:a linio de malsupre, kulpiginta anstataŭ
akuzinta;
„ 19, 3:a „ „ „ via paŝo anstataŭ
antaŭpaŝo



Książnica Podlaska
im. Łukasza Górnickiego w Białymstoku



000678348